

MUNAL, MEKSIKURBO

# “Voĉoj el la Tero”: Meksika Nacia Belarta Muzeo ekspozicias lingvan diversecon

Pascal Dubourg-Glatigny

*La ekspozicio Voces de la tierra: lenguas indígenas, estis vizitebla de la 8.08.2019 ĝis la 1.03.2020 ĉe Museo Nacional de Arte, Calle de Tacuba 8, Ciudad de México.*

Blanke pure brilanta, glimanta kiel sennuba ĉielo, T-forma tuniko akceptas la vizitantojn de nekutima ekspozicio ĉe la Nacia Belarta Muzeo de Meksikurbo (*MUNAL*). La nenombreblaj emajlitaj bakargilaj bulboj, el kiuj komponiĝas la skulptaĵo, aludas al la plumriĉaj vestaĵoj de la malnovaj popoloj de Mezameriko, la krucoformo pensigas pri la deviga kristanigo de la lando, kiu okazis rapide post la alveno de la hispanaj koloniistoj. Aŭtoro de la artaĵo estas la poldevena *Xawery Wolski* (naskiĝis en Varsovio en 1960), kiu jam delonge vivas en Meksiko kaj atestas pri ties realaĵoj kunigante pasintecon kaj nuntempon.

Ne facilas ekspozicii lingvojn, kaj la celo fariĝas defio por belarta muzeo, kiu kutimas prilabori kaj montri vidajn objektojn. La Nacia Belarta Muzeo de Meksiko tamen ne rezignis ilustri la historion de la enlandaj indiĝenaj lingvoj ekde la 16-a jarcento, kiam ilin ekkontaktis la dominonta hispana lingvo. Laŭ la oficiala katalogo de la Nacia Instituto por Indiĝenaj Lingvoj (*INALI*), en Meksiko estas nuntempe uzataj 68 lingvoj, kiuj grupiĝas en 11 diversaj lingvofamilioj kaj esprimiĝas en 364 variantoj. Kvankam la ŝtato ne posedas oficialan lingvon, uzo de la hispana estas necesa por aliri la juran sferon kaj la superan edukadon, malgraŭ ke preskaŭ unu miliono da homoj ne posedas ĝin. 6 % de la meksikanoj parolas almenaŭ unu el la indiĝenaj lingvoj, ĉefe en la suda kaj orienta partoj de la lando (statistikoj laŭ memdeklaro). La plej uzataj estas la naŭatla (aztekdevena), kun preskaŭ du milionoj da parolantoj kaj la majaa, kun naŭcent mil parolantoj. Ilia situacio en la unuagrada lerneja instruado de iuj regionoj progresis en la lastaj jaroj, kaj nun la nombro de lernejoj, kie ne troviĝas instruanto scipovanta la lokan lingvon, reduktiĝis al nur 8 %[1].

1. H. V. Robles Vásquez, M. G. Pérez Miranda (red.), “Panorama educativo de la población indígena y afrodescendiente”, INEE, Mexico, 2018.



*Ramon Cano Manilla (1888-1974), Indianino el Oaxaca, 1928, MUNAL, Meksikurbo.*



*Xawery Wolski, Sen titolo, 2017.*

La ekspozicio komenciĝas per la frua koloniisma periodo, kiam kleraj misiistoj ekinteresiĝis pri la lingvoj, transskribis ilin al la latina alfabeto, ektradukis kaj klopodis redakti priskribojn, gramatikojn kaj vortarojn. Sed tiu enkonduka sekcio ankaŭ montras la valoron de la lingvo kiel posedaĵo de teritorio. Atestas tion la kodekso "Historio de *Txacala*", finredaktita en 1585, en la hispana kaj naŭatla, el kiuj unu kopio estis sendita al la hispana reĝo. Pere de riĉa sistemo de ilustraĵoj kaj priskriboj ĝi ilustras la kulturan kaj politikan evoluon de la popoloj en la regiono ĉirkaŭ Meksikurbo post la alveno de la Hispanoj. Ankaŭ la podologiaj mapoj de *Cuauhtinchan* (kopiitaj ĉirkaŭ 1900 de *José Maria Velasco*) montras, kiom la spacorilato de specifa homgrupo influas la lingvostrukturon.

Dividita laŭ regionaj sekcioj, la ekspozicio prezentas la specifecon de la unuopaj lingvo-famil-



*Vido al la ekspozicio, muro de maskoj.*

lioj per objektoj, kiuj malkovrigas la kulturan specifecon. La objektoj kreitaj de la diversaj grupoj distingiĝas en Meksiko per ellaborita kolora kaj motiva sistemo, kiu rilatas al la nealfabetaj skribsistemoj de ties lingvoj. En ĉiu ĉambro la ekspozicio ne nur prezentas objektojn produktitajn de la popoloj sed ankaŭ montras, kiel la ekstera rigardo konstruiĝis, ĉar la bezono klasifiki en grupoj kaj subgrupoj ofte venis de ekstere. Vojaĝantoj kaj antropologoj, plejparte eksterlandanoj kaj ĉefe eŭropanoj, dokumentis ekde la fino de la 19-a jarcento la ĉiutagan realecon de la diversaj homgrupoj. La laborista fotografo *Walter Reuter*, enmigrinta




**Procentoj de la naŭatlaj parolantoj**

- Laŭ recenzo de la jaro 2000.
- Ĉefe parolata en Centra Meksiko.
- Nombro da parolantoj: 1 740 000.
- Denaskaj parolantoj 1,4 milionoj (1980).
- Latinlitere skribita ekde la 16a jarcento.

*Priskribo pri la naŭatla lingva mapo: El vikimedio. Fonto: INEGI (2005): Perfil sociodemográfico de la población hablante de náhuatl, p. 4: Población de 5 años y más hablante de náhuatl por entidad federativa, [en el año] 2000. Kun aldonaj nombroj el la esperanto retejo.*



MUNAL

*En ĉiu ĉambro la ekspozicio prezentas objektojn produktitajn de la popoloj.*

Meksikon kiel politika rifuĝinto en 1942, abunde kontribuis per filmoj kaj foto-serioj pri la vivo de la indiĝenoj. Ankaŭ la nederlandano *Bob Schalkwijk*, kiu hejmas ekde 1958 en Meksikurbo kaj kies verko ampleksas preskaŭ 400 000 fotojn, regule interesiĝis pri izolitaj popoloj de la lando.

Sed la komprenon de la popoloj konstruas ankaŭ la rigardo de meksikaj artistoj de la 20-a jarcento, kiuj ĉiam pli ofte ĉerpas en la tradicia repertuaro inspirfontojn por novaj esprimrimedoj. Elstaras la verkoj de Francisco Toledo, kiu kapablis enbildigi la kosmovidon de la indiĝenaj popoloj, Rufino Tamayo, kiu partoprenis en la antaŭmilita tiel nomata "muralista movado" de imponaj narativaj murpentraĵoj, la tzotzila fotografino kaj verkistino Maruch Santíz, kaj Maricela Gómez, kiu renovigas la multkoloran terakotan tradicion. Ili kontribuas al la kohereco de la meksikaj bunteco kaj unueco.

La lasta sekcio de la ekspozicio estas dediĉita al la lingvorajto. En la printempo de 2019, kiam oni finpreparis la ekspozicion, forpasis unu el la kvar lastaj parolantoj de la lingvo kiliŭa, en la meksika regiono de Suda Kalifornio. Pluraj lingvoj de la lando estas nun parolataj de malpli ol dek homoj, kaj preskaŭ du trionoj de la tuta meksika lingvaro riskas baldaŭan malaperon. Imponas muro, kolekto de maskoj, tradiciaj kaj nuntempaj: ĝi esprimas senvoĉajn vizaĝojn. Kvankam diversaj artistoj enkorpigas la kulturan specifecon en la nuntempan kulturon, tio ne savos la lingvojn. La arto ne kapablas konkurenci kun la politika kaj ekonomia forto de la asimilanta hispana lingvo, kiu posedas kreskantan tutmondan dimension. Tamen, kiel substrekas la kuratoroj de MUNAL, «rekono de ĉies popolo konservi sian memoron kaj decidi pri sia futuro donas al nia nacio ĝian identecon kaj fierigas nin». ■